Stine Andresen,

# Somera nokto

*tradukita de Manfredo Ratislavo*

Milda nokto de somero,
Kian sorĉon havas vi!
Vin stel-nokt‘ de primavero
Anstataŭas ne por mi.

Senripozas jen deziro,
Paca regas jen kreskad‘,
Jen lasado, jen sopiro,
Jen fariĝo, jen estad‘.

Kiel ĉe l‘ patrin‘ beate 1)
Kuŝas la naturo jen,
Estas, kvazaŭ Di‘ kompate
Irus tra l‘ kampar‘ kun ben‘.

En silento kaj solene
Staras tie la arbar‘,
Klinas kvazau pensoplene
Sin surkampe la spikar‘.

Kaj tra l‘ plenmatura tiu
Sonĝas kiel sonĝ-sonor‘,
Kiel akrigad‘ de iu
gren-falĉilo en la for‘.

. . .

Stine Andresen,

# Sommernacht

Sommernacht, du milde klare,
Welch ein Zauber ruht auf dir,
Nicht des Frühlings wunderbare
Sternennacht ersetzt dich mir.

Dort ein ruhelos Begehren,
Hier ein friedevoll Gedeih’n;
Dort das Sehnen, hier Gewähren,
Dort das Werden, hier das Sein.

Selig wie ein Mutterarmen
Ruht gesättigt die Natur,
Und ein göttliches Erbarmen
Wandelt segnend durch die Flur.

Feierlich, in tiefem Schweigen,
Steh’n die Bäume, dichtbelaubt;
Nur im Feld die Ähren neigen
Wie gedankenschwer ihr Haupt.

Durch die vollen, überreifen
Geht ein traumverlorner Klang,
Wie von fernem Sichelschleifen,
Wie von froher Schnitter Sang.

. . .

*Traduko de la Germana poemo "Sommernacht" de* STINE ANDRESEN *(geb. Jürgens, ∗1849-12-23 – †1927-05-13) en Esperanton de* MANFREDO RATISLAVO *(Manfred Retzlaff, Stettiner Str. 16, D-59302 Oelde, Germanio, ∗1938-11-04) en 1985–05.*

*Mr-187-2a / Arg-319-646 (2005-08-26 08:42:28)*

*La poetino vivis en Wyk aur la norda-frisa inaulo Föhr, estis edzino de muelisto, verkis krom la nordafrisa poemo "Swet hiamelkhaid" precipe poemojn en la germana lingvo.*

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas* STINE ANDRESEN *(geb. Jürgens, ∗1849-12-23 – †1927-05-13).*

*Arg-319-645 (2005-08-26 09:05:32)*

*Die Dichterin lebte in Wyk auf der nordfriesischen Insel Föhr, war Ehefrau eines Müllers, schrieb außer dem friesischen Gedicht "Swet hiamelkkaid" (= Süße Heimlichkeit) hauptsächlich Gedichte in hochdeutscher Sprache.*